

Johann Wolfgang von Goethe, Elf-reĝo <i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Elfregho <i>tradukita de Richard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Erlkönig	Johann Wolfgang von Goethe, Elfregô <i>tradukita de Joachim Gießner</i>
Kiu rajdas tra nokt', kun vent' pro l' vet'?	Malfrua ĉeval' en nokta vent'?	Wer reitet so spät durch Nacht und Wind?	Rajdadas tra vent' kaj noktnebul' la patro kun febranta etul'.
Jen estas patro kun infanet':	La patro estas en korturment'.	Es ist der Vater mit sei- nem Kind;	La knabon firmtenas sur sia sel'.
Li havas knabon en zorga pen',	Enbrake tenas infa- non li,	Er hat den Knaben wohl in dem Arm,	braksirmas lin varme sub mantel'.
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.	sekure, tamen kun zorg' pri ghi.	Er fasst ihn sicher, er hält ihn warm.	
"Filet', vi kial ekstre- mis pro tim'?"	Fileto, kial vi timas nur? -	Mein Sohn, was birgst du so bang dein Gesicht?	"Ho fil', vi tremas, ŝvitperlas la frunt'?"
"Patreto, jen! elfreg' en proksim'!	Eksonas, paĉjo, elfa murmur'.	—	"Jen, patro, elforeĝ' en profund',
La elforeĝo, kun vost' kaj kron'!"	Jen glitas reĝo kun elfoj mil. -	Siehst, Vater, du den Erlkönig nicht?	la elforeĝo kun kron' kaj trenaj'."
"Filet', ĝi estas nebul- zon'."	Nebul' ĝi estas, mia fil'. -	Den Erlenkönig mit Kron' und Schweif? —	"Filet', nebul' nur kaj arbaĵ'."
"Ho venu do, infan' al mi!	"Ho, ĉarma knabo, sekvu min!	„Du liebes Kind, komm, geh mit mir!	"Vi ĉarma knab', ho, venu nun,
Mi belajn ludojn lu- dos kun vi:	Juvelojn havas mia patrin'.	Gar schöne Spiele spiel' ich mit dir;	ni kune ludos en bril' de lun'.
Ĉe l' bordo brilas ko- lora flor',	Kolorajn florojn ri- cevos vi,	Manch' bunte Blumen sind an dem Strand,	Kaj buntaj floroj ĝojigos vin,
Mia panjo havas ve- stojn el or'!"	Kaj vi ludos gaje kun papili'."	Meine Mutter hat manch gülden Gewand." —	orajn vestojn havas mia patrin'."
"Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',	Ho patro, ho paĉjo, la elfregô jen!	Mein Vater, mein Vater, und hörest du nicht,	"Ho patro, ho patro, ĉu aŭdas ne vi?
Kion promesas elfreg' en sekret'?" —	Li logas min for al luksa festen'! -	Was Erlenkönig mir leise verspricht? —	L'elfregô dolĉe pro- mesas al mi."
"Ne timu, filet', ne ti- mu vi,	Ne timu! Dormu, mia etul'!	Sei ruhig, bleibe ruhig, mein Kind;	"Karulo, trankviliĝu, infan',
Murmuras vent' en velka foli'."	Susuras arboj en la nebul'. -	In dürrn Blättern säuselt der Wind. —	susuras vento tra se- ka kan'."
...	...	...	...

<p>”Knabeto bela, sekvu min’, La filinoj miaj vartados vin’. La filinoj, lertaj en danca rond-form’, Kantante, dancante vin lulos al dorm’.”</p>	<p>”Nu venu, fajna knabo, kun mi! La princinoj zorgos kun ĉarm’ pri vi. La princinoj dancos dumnokte en rond’ Kaj kante vin lulos en bela rotond’.”</p>	<p>„Willst, feiner Knabe, du mit mir gehn? Meine Töchter sollen dich warten schön; Meine Töchter führen den nächtlichen Reihn Und wiegen und tanzen und singen dich ein.“ —</p>	<p>”Vi, ĉarma knab’, akompanu min, la filinoj vartos, dorlotos vin. La filinoj dancos en nokta rondad’, vin lulos kaj kantos por via dormad’.”</p>
<p>”Patret’, ĉu vi vidas, patret’“, mia kar’? En lok’ malhela jen elfinar’!” ”Filet’, filet’, mi vidas precize: <sup>2</sup> Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize.”</p>	<p>Ho patro, ho paĉjo, filinoj de l’ reĝ’ Insidas tie malantaŭ la heĝ’. - Mi bone vidas, mia filet’, De grizaj salikoj jen estas aret’. -</p>	<p>Mein Vater, mein Vater, und siehst du nicht dort Erlkönigs Töchter am düstern Ort? — Mein Sohn, mein Sohn, ich seh’ es genau: Es scheinen die alten Weiden so grau. —</p>	<p>”Ho patro, ho patro,” ĝemegas la fil’, ”elfinoj jen kun obskura bril’!” ”Filet’, filet’, ekkonas mi ĝin, salikoj la grizaj trompas nur vin.”</p>
<p>”Mi amas vin, ĉarma vi, mia knabet’, Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet’!” ”Patreto, patreto, li prenas min for! Elfreĝo kaptas min, ho dolor’!”</p>	<p>”Mi nepre vin bezonas por mia eskort’. Se vi ne konsentas, estiĝu perfort’!” - Ho patro, ho paĉjo, ve, kia kruel’! Elfreĝo venis al sia cel’! -</p>	<p>„Ich liebe dich, mich reizt deine schöne Gestalt; Und bist du nicht willig, so brauch’ ich Gewalt.“ — Mein Vater, mein Vater, jetzt faßt er mich an! Erlkönig hat mir ein Leids getan! —</p>	<p>”Mi amas vin, allogas min via belec’, kaj se vi ne volas, vin venkos fortec’!” ”Ho, patro, li venas, nun sentas mi lin! Elfreĝo krude perfortas min.”</p>
<p>La patro ekstremis, kun granda rapid’ Li rajdas, kaj plende en brak’ ĝemas l’ id’. Alvenas patr’ al hejma kort’, L’ infanon prenis jam for la mort’.</p>	<p>La patro rajdas kun granda rapid’. Li timas. En brak’ lia ĝemas la id’. Li pene venas al la kort’. La knabon prenis jam for la mort’.</p>	<p>Dem Vater grauset’s; er reitet geschwind, Er hält in Armen das ächzende Kind, Erreicht den Hof mit Mühe und Not; In seinen Armen das Kind war tot.</p>	<p>Rapid-horora la patra rajdad’ - en brak’ aŭdiĝas singulta ĝemad’. Kun pen’ li venas ĝis la kort’, prenita estas la knab’ - de l’mort’.</p>
...	...	...	...

<sup>2</sup>Mi, Manfred Retzlaff, proponas por tio, ke la rimvortoj estu – same kiel en la originale – akcentataj sur la lasta silabo, jenan ŝanĝon:

„Fileto, precize mi vida ĝin:  
La grizaj salikoj jen trompas vin.“

Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-588-1694 (2013-02-26 14:50:24)

Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-588-1186 (2014-03-14 13:06:19)

Tiu ĉi traduko aperis en 1981-07-01 en la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz (Rikardo Shulco) mem. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-588-1185 (2013-02-26 14:59:44)

Pri la verkinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Wolfgang\\_von\\_Goethe](http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Wolfgang_von_Goethe),

pri la tradukinto la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni\\_Grabowski](http://eo.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski).

Pri la balado vidu: [http://de.wikipedia.org/wiki/Erlk%C3%9cnig\\_\(Ballade\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Erlk%C3%9cnig_(Ballade)).

La muzikon, kiun verkis la germana komponisto Franz Schubert, oni povas aŭdi en la reta video <http://www.youtube.com/watch?v=e40Mm8baD7A>.

Pri la komponisto informiĝu en [http://de.wikipedia.org/wiki/Franz\\_Schubert](http://de.wikipedia.org/wiki/Franz_Schubert) -

Traduko de la Germana poemo “Erlkönig” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-588-1242 (2012-10-18 16:09:46)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.